

Lingvaj defioj – Volumo 10

Tentakloj kaj ligiloj



Petro Desmet'

Tentakloj kaj Ligiloj

Eldono de Flandra Esperanto-Ligo

Serio „Lingvaj defioj” n-ro 10

Tio ĉi estas nekompleta senpaga provversio.
Ĝi povas esti libere kopiata.

Enkonduke

En tiu ĉi bitlibro mi klopodos iom pritrakti kelkajn restantajn aferetojn kaj konstatojn, sed precipe mi volas resumi ĉion kio estas pritraktita en la naŭ antaŭaj bitlibroj. La tekstoj estiĝis dum multaj jaroj da okupado pri esperantaj verkoj kaj projektoj. Ofte malantaŭ simplaj vortoj kaŝiĝas grandegaj klopodoj kaj rimedoj. Ofte ankaŭ estis konsultitaj homoj el plej diversaj partoj de la mondo. Tiel la tekstoj ankaŭ donas bildon pri tio kio estas ebla danke al niaj interŝanĝoj de ideoj, kaj precipe danke al komparado de tre diversaj lingvoj.

La fremdaj lingvoj plej ofte estas komentitaj kaj klarigitaj per denaskaj parolantoj de ili. Tiuj homoj ankaŭ montris ke ili estas kapablaj, per nia internacia lingvo, transdoni siajn konstatojn kaj ideojn. Ĉiu kun respekto por ĉiu alia. Kiam oni legas la rezultaton ĝi ŝajnas tute logika, tute klara, tute memkomprenebla sed la Ovo de Kolumbo ankaŭ estis treege facila

problemo, ĉu? Nu, mi rediru al vi: ofte mi bezonis longan tempon por atingi komprenon! Kaj mi trovis iom domaĝe se tiuj klopodoj nun, post mi, simple forventumiĝus. Tial - sed tamen danke al la insisto de iuj amikoj - mi decidis kunigi la tekstojn en facile atingebla fonto.

En tiu ĉi libro oni ankaŭ trovos panoraman superrigardon de la tuta serio, kaj plie eĉ la liston de la plej gravaj frazoj traktitaj en la diversaj libroj ... kaj ĉi tie mi aldonis kiom eble plej simplan klarigon de ĉiu (aŭ preskaŭ ĉiu) el tiuj frazoj. Absoluta certeco pri praveco ne estas ... pri unu aŭ du mi mem ankoraŭ havas etajn dubojn. Do ... se vi trovas (ne surbaze de via pripensado, sed post serioza esplorado) por iu pli bonan klarigon ... ne hezitu deklari tion laŭte kaj firme!

Kun danko pro via apogo.

1. Korŝira dilemo aŭ anĝeleca malscio?

Eble vi miros ... kiel mi miris!

Dum diskutado kun amiko en la reto, ni parolis pri travivaĵo lia, ... rilate instruadon de fremdlingvo ... nu, fremdlingvo? Jes, sed al kiu?

Anekdoto

Iu regula retkorespondanto, Usonano, rakontis al mi pri sia vivo, kaj inter alie li rakontis ke li kiel infano edukiĝis en Japanujo. Li tie ne estis en iu internacia lernejo sed vizitis japanan elementan kaj mezgradan lernejojn. Kiam komenciĝis la instruado de la angla lingvo li do ankaŭ "*devis lerni la anglan lingvon*". Sed ... kiam li legis la anglan (usonan) tekston, en sia denaska lingvo, la instruistino ne estis kontenta, ĉar li ne prononcis laŭ la lernolibro! Li eĉ estis punata pro sia

"malbona prononco".

Faktoj

Mi legigas al vi kopion de parteto de nia konversacio:

Nu, kiam mi komencis la unuan jaron ĉe Bunkyo-ku-ritu Daisan Tyūgakkō, mi komencis ankaŭ la lernadon de la angla lingvo laŭ la japana lerneja normo. En la lernolibro, la lernendaj frazoj apudhavis prononc-indikojn per la katakana silabaro, kiun oni uzas en la japana por skribi vortojn importitajn el aliaj lingvoj (escepte de la klasika ĉina lingvo). Por la angla frazo "I have an apple", t.e. "Mi havas pomon", la libro indikis, ke oni diru "アイハヴ アナップル", t.e. "Ai habu a nappuru". Sed la ĝusta prononco de la angla frazo pli proksimas al "Aj heva napel" (aŭ eĉ pli proksime, se vi scipovas la sciencan API-alfabeton, "'aɪ 'hæv ən 'æ.pəl". Sed se mi diris "'aɪ 'hæv ən 'æ.pəl" tute ĝuste laŭ la usonangla

normo, la instruistino (kiu mem apenaŭ scipovis konversi angle malgraŭ dek jaroj da studado) devis aljuĝi al mi minusan markon pro mia misprononcado, kiun ŝi devis juĝi laŭ la prononc-indikoj en la lernolibro.

Kaj fantazio?

Nun oni povas demandi sin ĉu li trafis netaŭgan instruistinon. Ĉu al ŝi mankis fantazio? Ĉu ŝi vere pensis ke la knabo malbone prononcis? Oni povas demandi sin ĉu aliaj instruistinoj, aŭ instruistoj, agus laŭ la sama maniero ... aŭ ĉu ili (laŭ la logiko sed kontraŭ la lernolibro) profitus la okazon por uzi lin kiel modelon? Mi havas la senton, laŭ mia kompreno (miskompreno?) de la japana socio, ke plej multe da instruistoj obeus la "ordonojn" de la lernolibro, la ordonojn de la ŝtato, sed ... mi povas erari. Ĉiuokaze mia amiko estis punata, ricevis malaltajn poentojn ... La dilemo de la instruistino certe ekzistis ... krom ... sed tion oni ne rajtas supozi pri instruistino, ĉu?

Kiel kio kaj kial

Fakto estas ke vere bona lingvoinstruado devus esti ofertita de denaskuloj, kiuj devus havi, kompreneble, minimuman bazan konon de la lingvo de la lando en kiu ili instruas, aŭ kiuj devus esti helpataj de enlandano. Nur tiam oni povus atingi bonajn rezultojn, kun nur minimuma akĉentado. Estas fakto ke homoj ne konscias pri sia fremdlanda akĉento, ili tutsimple ne aŭdas tion ... ankaŭ ĉar ili kutimas esti ĉirkaŭataj de homoj kun sama falsakĉento. Sed ... en plej multaj landoj la leĝoj ne permesas tion, ĉar ili ne rekonas la diplomojn de eksterlandanoj, aŭ ili deziras "stultajn" diplomojn (diplomo kiu atestas konon de la angla lingvo, de iu denaska angloparolanto.). Honestan pritrakton de la problemo vi trovos en la fama artikoleto de **William Auld: "Ĉu prefere naci-lingvo?"** trovebla en multaj lokoj, i.a. en "Pri lingvo kaj aliaj artoj.". Li honeste skizas tie la abomenon kiun denaskaj anglalingvanoj sentas kiam ili ĝentile aŭskultas fremdulon paroli angle.

Limoj kvazaŭ netransvenkeblaj

Eĉ tiam oni tamen ne devas esperi ke la lernantoj akiru pli ol mezan nivelon. Altan nivelon de lingvo oni akiras nur en sia propra lingvo ... krom, kompreneble, se oni transloĝiĝas kaj plenkreskas en fremda lando. Tio estas mia opinio ... sed, mi povas erari! Sed, mi almenaŭ deziris ke vi konatiĝu kun la spertoj de mia amiko Leland.

2. Peniga nederlanda

Mi estas (tre) maljuna. Mia domo estas treege malnova. Ĝi ŝajne tute ne konstruiĝis por loĝigi min tiel longe, ĉar ĉiutage ĝi pli kaj pli kadukiĝas (kiel mi cetere). Nun, antaŭ kelkaj tagoj, mi rimarkis ke ligna tabulo fronta de la defluejo putriĝis kaj estas preta forfali.

Lango glaciiginta

Mi devis serĉi iun lignaĵiston por ripari ĝin, aŭ pli ĝuste por meti novan. Tial mi bezonis la nederlandan vorton por indiki, por nomi, tiun tabulon. Mi, hazarde, memoris ke mi iam lernis por ĝi la vorton „*stormplank*”, kaj jes, la lignaĵisto tuj komprenis pri kio temis. Sed ... je mia miro la vorto ne troviĝas en van Dale! Mi do lanĉis serĉadon inversan, mi serĉis ĉiujn artikolojn kiuj enhavas la vorton „*dakgoot*”, ĉar nepre tiu vorto devas aperi en la difino. Kaj jes, vere, mi trovis ke „*boeideel*” estas „tabulo, najlita kontraŭ la

eksteraĵo de muurplaat, kiu formas la starantan flankon de la defluejo”.

Plusinstruo

Mi lernis ankaŭ kelkajn aliajn terminojn, ĉar la serĉado liveris al mi 26 interesajn artikolojn (+ 1 neinteresan: *zink*) rilate al defluejo. Mi lernis ke tia ligna defluejo konsistas precipe el tri partoj: nome *boeibord*, *muurplaat* kaj *boeideel*, kaj ke ĝi pli precize nomiĝas *boeigoot*. La *boeibord* estas la oblikva tabulo (laŭ inklino de la tegmento), la *muurplaat* aŭ *spanplaat* estas horizontala kaj la *boeideel* estas vertikala. En Esperanto mi facile povos paroli pri: **fronttabulo**, **tegmenttabulo** kaj **fundotabulo de defluejo**, ĉu? Kvankam tre multe da domrilataj terminoj troviĝas en la Bildvortaro, pri defluejo ne aperas la detaloj. Mi supozas ke la vorto *stormplank* estas flandra, aŭ eble eĉ nur regiona.

Kaj kio pri ŝutroj?

Mia domo havas ankoraŭ la eksterajn

fenestroŝutrojn, kvankam ankaŭ ili jam ekputriĝis ... El la kvar, jam tri perdis kelkajn oblikvajn tabuletojn, kaj unu estas jam pli terura ruinaĵo ... Tiaj ŝutroj nun vere ne plu estas kutimaj. Kiam oni malfermas la ŝutrojn oni fiksas ilin al la dommuro per rektigo de pivoteblaj kaj fikseblaj feraj torsetoj (homfiguretoj, ekde la talio supren). Laŭ mia memoro ĉie ĉe tiaj ŝutroj oni trovis tiajn samajn ŝutrotenilojn, ŝutrofiksilojn ... sed kiel ili nomiĝas en la nederlanda? Kara nederlandlingva leganto, ĉu vi scias? Mi havis la senton ke mi iam aŭdis la nomon, sed tamen ne povis retrovi ĝin en mia memoro. Denove mi saltis al van Dale, kaj pere de „*luiken en artikolo*” mi trovis ke tiaj ŝutroteniloj nomiĝas *windwervel*, se mi bone komprenis van Dale! La difino: (ĉe lignaĵistoj) *wervel* per kiu(j) lukoj estas fiksitaj al eksteraj muroj. Mi skribis *wervel* en la nederlanda, ĉar mi supozas ke ĝi estas vorto kiun miaj legantoj ne nepre konas! Do, *wervel*: (krom la anatomia signifo, kompreneble): turnbastoneto kiel simpla fermilo de pordoj, fenestroj ktp. Do la cirklo estas fermita, ĉu ne? Anatomie: *wervel* = vertebro.

Vi vidas do ke povas esti problema afero trovi la ĝustan vorton en la nederlanda. Tute ne hontinde estas ke oni ne konas ĉiujn terminojn en sia nacia lingvo, do ... ni ne estu pli severaj pri Esperanto! Mi invitas nenederlandlingvanoj serĉi la ĝustajn vortojn en sia nacia lingvo!

En la kolekto de miaj fotoj vi povos admiri la ŝutrojn kaj poste la ŝutrotenilojn:





Reagoj

Griza Leono: Kara Petro, mi ankaŭ ne

konas multajn "oficialajn" terminojn por konstruaĵeroj.

Eble vin interesos jena retejo:
www.geramat.be/Gerpan/docs/Gerpan%20-%20NL%20-%20technische%20tekeningen.pdf Ĉar la nederlanda ne havas la sistemon de "oficialaj vortoj", mi ne kredas, ke multaj flandroj konas tiujn vortojn. Mi kredas, ke nur tre malmultaj sciis, pri kio temas.
Amike salutas Leo

Petro: Vi tute pravas. Mi akordiĝas kun vi. Aliflanke ... mi bone amuziĝis.

En la unua versio mi eraris, kaj uzis la vorton "luko" en la senco de "ŝutro" ... Mi pardonpetas. Temas pri false amiko de la flandra "*luik*".

Julio Pedrosa: Saluton, Petro!

Tiu malkono de terminoj ne estas ja propraĵo nur via: mi ankaŭ ne konas la nomon de tiuj turnbastonetoj en mia lingvo (la portugala) - kvankam ili ankoraŭ

troveblas en domoj kun malnovaj tiaj fenestroj en Brazilo.

La portugalan vorton por "ŝutro" mi mem lernis (aŭ rememoris) dum la legado de ĉi tiu via artikolo: "*porta de janela*" (laŭvorte: "pordo de fenestro"). Jen E-o igas onin koni pli sian lingvon!

3. Finfine ni naĝu!

Tre baldaŭ aperos la oklingva proverbaro. Povas esti interese ebligi al miaj legantoj iom antaŭĝui tion ... kaj tiel akiri ideon pri ĝia utilo. Vi scias ke mi mem, de tempo al tempo, karambolas kun esperanta proverbo kaj ne sentas min tute komforta pri la klarigo de la proverbo. Nur tre malofte PIV helpas min, sed plej ofte Marko kaj Ludoviko savas min el mia nekompreno.

Ŝipoj grandaj kaj malgrandaj

Mi nun koliziis kun "**granda ŝipo bezonas profundon**", kiun mi do aparte renkontis. En PIV la proverbo estas citita, sed sen ia ajn klarigo. Mi do rapide konsultis la esperantan proverbaron por kontroli ĉu ĝi aperas kune kun aliaj proverboj en sama paragrafo. Kaj jes, ĝi aperas en paragrafo **149a**, kune kun du aliaj. Mi kopias por vi, sed samtempe kopias la respondajn nacilingvajn paragrafojn.

Paragrafo 149a

Большая.

149. Большому кораблю, большое и плавание.

149. Gruba ryba spodem pływa.

149. Tel navire, telle eau. Aux grands maux, les grands remèdes.

149. Großes Schiff braucht großes Fahrwasser.

Grando, proporcieco.

149. Fiŝo granda naĝas profunde. Grandaj malbonoj - grandaj rimedoj. Granda ŝipo bezonas profundon.

Unua helpilo

En la proverbaro estas titoloj, kapvortoj, nur ĉe la rusaj proverboj kaj en iu maniero ankaŭ ĉe la esperantaj. Ludoviko aldonis

en la fino de la Esperanta Proverbaro iun Alfabetan Registron. En mia eldono mi aldonis al ĉiu paragrafo respondan vorton el tiu registro, kaj vi konstatos ke tio multe helpas por ĝusta kompreno de la proverboj.

La rusa paragrafo estas la dua el serio de tri, 148 ĝis 150, kaj la komuna titolo de la tri paragrafoj estas **Большая**, do "pli granda". La ideo fakte estas, kiel la esperanta titolo indikas, proporcieco; por 148 kaj 149 rekta proporcieco, kaj por 150 inversa proporcieco. La komuneco, la komuna ideo en ĉiuj proverboj el la 149a paragrafo estas ke ekzistas rektproporcia rilatumo inter la dezirata atingotaĵo (solvo de problemoj; sukcesa luksa grandfamilia vivo; grandvalora bonaĵo) kaj la bezonata peno por tion atingi ... sed ekzemple la tri esperantaj proverboj certe ne estas ĉiam interŝanĝe uzeblaj! Ili nepre ne havas la saman signifon.

PIV-a malforto

En PIV nur unu el la proverboj estas klarigita, sed tiu tiam tamen du fojojn! La granda fiŝo aperas ĉe naĝi kaj ĉe profunda. Ĉe **naĝi** la diraĵo estas klarigita: por grandaj malfeliĉoj, grandaj rimedoj. Ĉe **profunda** oni trovas la klarigon: por atingi gravan celon, oni bezonas gravajn rimedojn. La unua klarigo ŝajnas al mi netaŭga, sed la dua sufiĉe klaras, kvankam mi mem preferus penojn anstataŭ rimedojn. La unua klarigo fakte pli taŭgas por la dua esperanta diraĵo. La du aliaj diraĵoj troviĝas en PIV, sed ili estas nur cititaj, sen plia klarigo. Kaj, laŭ mi, la tria diraĵo el si mem ne estas tiom klara!

Nacilingva helpilo

Interese estas ke mi finfine trovis la signifon de la tria proverbo ... pere de responda nederlanda proverbo! En la nederlanda al la tria respondas: *groot schip, groot water* (granda ŝipo, granda (= profunda) akvo), kaj nia norma vortaro klarigas ĝin tiele: granda mastrumado necesigas multe da mono. Mi devas

konfesi ke mi ne sciis tion, ke mi do lernis ĝin nun el mia norma vortaro, kaj eĉ iom pridubis sed aliaj klarigaj proverbaroj nederlandaj konfirmis la signifon. Alia konstato trovebla danke al la patra frazeologio estas ke la granda ŝipo estas la plej universala el la proverboj de la paragrafo, ĉar ĝi aperas, se ne identa tamen tre parenca, en tri el la kvar lingvoj (RU, FR, GE).

Instruo

La oklingva proverbaro ebligas al ni retrovi la manieron laŭ kiu Ludoviko prilaboris la proverbaron. Li klare, kaj tion tre ofte, trovis inspiron en ĉiu el la uzataj lingvoj! La esperanta paragrafo fakte kunigas en si ĉiujn cititajn nacilingvajn diraĵojn. Unua proverbo estas laŭ la pola, dua laŭ la franca, kaj la tria, kiel jam citita, eĉ laŭ la triopo. Tion oni nun do povos bone konstati en la nova paralela eldono. Kaj la indiko de la temo "grando, proporcieco" klare indikas kiel la cititaj diraĵoj parenkas. Oni ankaŭ ofte facile trovos la rezonadon de Marko

Zamenhof!

Reagoj

Ĵeromo: Tre interesa estas via konkludo pri la labormetodo de L. L. Zamenhof. en la okazo de la proverbaro la fontaj lingvoj estas certe konataj, kaj vi konstatas, kiel Zamenhof elektis jam internacian aŭ (manke de internacia) miksan formon. Tio probable similas al la maniero, kiel li elektis la vortojn de la lingvo: jam internaciajn (kiel "sultano" kaj kiel ni daŭrigas per la 15a fundamenta regulo) aŭ miksajn (kiel "ĝardeno" kaj kiel ni ne daŭrigas). Por la vortoj ni vidas la labormetodon malklare, ĉar ni ne scias precize, kiujn lingvojn Zamenhof konsideris, kaj la internacieco de lia epoko intertempe nebuliĝis. Danke al la plurlingva proverbaro la labormaniero iĝas trasidebla.

Pri la du francaj formoj "*tel navire, telle eau*" (kia ŝipo, tia akvo) kaj "*aux grands maux, les grands remèdes*" (al grandaj misaĵoj grandaj kuracoj), mi konfesas, ke

mi ne konas la unuan kaj bone konas la duan. eĉ se oni ne tro fidu ĝiajn kalkulojn, guglo trovas la unuan 52-foje, la duan 234000foje.

Eble tio estas okazo de evoluinta internacieco. aŭ eble tio ekzempligas, kiel Zamenhof rezonis per informoj pri ekzisto de iuj formoj, ne ĉiam sciante pri ilia vera uzateco.

Petro: Dankon pro viaj vizitoj, kaj viaj komentoj. Nepre ludas rolo ke tiu proverbaro de patro Zamenhof estas ja pli ol centjaraĝa!

Bernardo: Mi antaŭĝojas la baldaŭan aperon de la Proverbaro. Feliĉon al vi!

Petro: Ĝi kuŝas preta ... nur ... estos granda investo por FEL! Sed; espereble pro sukceso de Bildvortaro, ili decidis eldoni.

4. La Miso de Liso

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga
provversio.

5. *Bero, bero, bero ... bereto*

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga
provversio.

6. Ĉenreakcio per *Bildvortaro*

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga
provversio.

7. Biblia Kaprompaĵo

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga
provversio.

8. Mariskarabeto

Inter la skarabetoj plej konataj, kaj plej facile rekoneblaj, estas la kokcineloj, kiuj en ĉiuj lingvoj havas multe da diversaj nomoj. En la germana lingvo mi trovis dekon da nomoj, kaj ankaŭ en la nederlanda tiom da estas! De dibesteto al maribesto kaj sunbesto aŭ sunskarabo kaj tiel plu. La difino en PIV tute klare indikas pri kio temas: Kokcineloj: duonglobformaj insektoj el la ordo de koleopteroj ofte kun certe nombro de rondaj makuloj sur la elitroj, kaj manĝantaj precipe afidedojn kaj koĉojn; popolnomoj: Di-best(et)o, maribesto, mariskarabo.

Taga novaĵo

En nia ĵurnalo ĵus aperis interesa artikoleto pri ĝi. Mi ĝin tradukis.

*La eŭropa aŭtoĥtona mariskarabeto
malprogresas pro supremacio de azia*

speco. Manĝema enmigrinto el Azio forfalĉas la herbon de antaŭ la piedetoj de niaj propraj mariskarabetoj. Ankaŭ en Britujo kaj Svislando sep el ok mariskarabetoj suferas pro la alveno de la multkolora mariskarabeto el Azio. Tiu ĉi estis enkondukita fine de la naŭdekaj jaroj en Eŭropo kiel biologia kontraŭbatalanto de afidedoj en agrikulturo, sed ĉirkaŭ la jarcentŝanĝiĝo ĝi eskapis el la varmdomoj kaj nun mem fariĝis plago.

Tio, kion biologoj jam longe timis, ke la ekzotulo forpuŝus enlandajn specojn, nun realiĝis, kiel pruvas dektrijarlonga nombrado en kvin eŭropaj landoj, sub la gvido de la flandra instituto por natur- kaj forstesploro (Inbo = Flinafo). Miloj da volontuloj faris por tio pli ol ducent mil konstatojn. En la revuo Diverseco kaj Distribuoj Flinafo raportas, kune kun svisaj kaj britaj kolegoj, kiel la progreso de la azia mariskarabo kondukis al malprogreso de ĝia eŭropa konkurenculo.

En Flandrujo nun la nombro de la dupunktaj mariskarabetoj malaltiĝis je

tridek elcentoj, kompare kun la jaro 1999, deklaras Timo Adriaens de Flinafo. En Britujo malaperis eĉ 44 %. La azia enmigrinto, tiel kiel la dupunkta maribesto preferas loĝi en arboj. Kaj, ĉar la azia estas pli granda, ĝi superas la enlandan specion ĉe la ĉasado de afidoj, kaj plie ... ĝi eĉ manĝas ĝiajn larvojn.

La seppunkta maribesto iom sukcesas savi sin, precipe ĉar ĝi estas same granda kiel la aziano, kaj ne vivas en arboj, konkludas Adriaens. "Ankaŭ savas sin la dudek-dupunkta maribesto, kiu manĝas ŝimojn kaj ne afidojn. La aliaj specioj ĉiuj malprogresas." En nia lando oni renkontas sesdek diversajn speciojn de kokcinoj.

Ne ekzistas maniero por ekstermi la eksterlandulojn. "Ni povas nur esperi ke la naturaj malamikoj de la enlandaj maribestoj ekŝatos la azian specion", diras Adriaens. "Sed nepre daŭros ankoraŭ iom da tempo antaŭ ol ili tiel evoluos. En la nuna momento niaj rabovespoj kaj rabomuŝoj tute ne montras intereson".

(El "la Standardo" – 8.2.2012)

Kiel distingi?

Ekzistas 3000 specioj de maribestetoj, sed multaj sin distingas per la nombro de makuletoj, kio permesas inventi simplajn nomojn. Tamen ... ne de 1 ĝis 3000!

La artikoleton akompanis sep bildoj: de la azia multkolora, dupunkta, seppunkta, dekpunkta, dek-kvarpunkta, dudek-dupunkta maribestoj kaj la melduodibesteto. Ne ĉiuj estas ruĝaj! Plej populara ŝajnas esti la seppunkta.



Ne nur por scienculoj

La artikolo aperis en tagĵurnalo. La lingvo estas tia kia oni ĝin supozas ĉe ordinara homo. Do ankaŭ en la esperanta versio devus esti nenio eksterordinara! Kaj mi pensas ke pro la kunteksto oni facile povas diveni la sencon de ĉiuj vortoj, eĉ de elitroj ... sed eble ne de koĉoj? (koĉo estas la besteto el kiu oni ekstraktas koĉenilo).

9. Ne "ulo" sed "tulo"!

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga
provversio.

10. Humila konsciiĝo

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga
provversio.

11. Ĉu ni vere bezonas Mantelzorgon?

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga
provversio.

12. Protekta Hidro de la Verda Lago

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provversio.

13. Ankoraŭ pri bestoblekoj

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga
provversio.

14. Provo de Pravo de Proverbosenco

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga provversio.

15. Ekzemplo de eta ĝojiga travivaĵo de vortaristo

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la senpaga
provversio.

Bitlibroj - priskribo kaj enhavtabelo

I. Proverboj sub lupeo

Enkonduko en la problemo de proverbaresplorado. Kun ekzemploj de kelkaj esploroj. Listo de historiaj malĝentilaĵoj pri virinoj ... Eseeto de R. Haupenthal pri la esperanta Proverbaro.

1: Enkonduko

2: Fontoj kaj helpiloj

3: Facila enigmeto

4: Orumitaj sapvezikoj

5: Flandre parolas Breŭgele

6: Breŭgel en verdaĵoj

7: Proverbe via

8: Arbaro aŭdas, kampo vidas

9: Traflugis anĝelo preter orelo

10: Kiu ĝuas kion?

11: Universaleco de Absurdo

12: Arĥaikaĵoj

13: Proverbo Enigma

14: Logika Defio

15: Enkonduko en proverbaro: teksto de
Haupenthal

II. Esperanto kaj kulturo

Surbaze de amuza rakonto de M. Boulton mi argumentas kaj pruvas la kulturan valoron de Esperanto, kaj poste klarigas plurajn proverbojn kaj esprimojn.

1: Enkonduke

2: Miru kun mi pri la mirakla Esperanto

3: Ĉu Esperanto estas/havas kulturo(n)?

4: Mallonga Paŭzo

5: Realisma Konstato kaj Logiko

6: Ni daŭrigu nian legadon

7: Eppur si muove: Kaj tamen ĝi
moviĝadas!

8: Teorio de Evoluado, laŭ Petro

9: Kaj tamen ĝi plie moviĝadas

10: Persona relativeco

11: Simpligita Anatomio inter la Linioj

12: Sociolingvistiko

13: Esenco de Esperanto

14: Esperantokulturo

15: Rozario

16: Gastoj

17: S-ro PIV-a Moŝto

18: Fundamenta Leciono

19: La miraklo de Vivo

20: Mirindaj kaj mirigaj Saloj

21: Granda Vortaro Ĉina-Esperanta

III. Vortarludoj

Pli ol la antaŭaj tiu ĉi libro pritraktas la lingvon surbaze de vortoj ... kaj la problemon de difinado pere de kvin naciaj lingvoj. Ankaŭ oni trovos ekzemplojn de la problemo de serĉade de taŭga vorto por nacia nocio.

1: Enkonduko

2: Helpu min retrovi dormon!

3: Kio estas la bazo de mia pripensado?

4: Kion kaŝas vorto?

5: Ĉu vi konas la germanan rigidan
Makson?

6: Ĉu lumbriko blekas kiel leono?

7: Etimologio de Etimo

8: Sidante en pudingo, mi alvokas miajn
savantojn!

9: La Mirinda Mondo de Mimo kaj Momo

10: Miogalo Mio Kio? Galo!

11: Fundamentaj Ŝtonoj de Falpuŝiĝo

12: Arkaikaĵo neevitebla, kaj.. cetere ...
riĉiga

13: Roz(et)o en Herbejo

14: Tri Kultureroj

15: Tuŝoŝtono; japana tegmentleporo

16: Dio sendu al ni lumon!

17: Kamelkaprino kaj Kamloto

18: Kamelkaprino

19: Naŭa Aldono al Fundamento: La
Granda Salto Antaŭen

IV. Vortoj, vortaroj, vortaristoj

Skizas la problemon de kompleteco de
lingvo ... kaj la absolutan devon de
vortaristo ĉiam kaj daŭre esti atenta, dum
legado, dum aŭskultado de radio, de
spektado de televido ktp ...

1: Kaj obeante la ordonon de sia kreanto,
plantido iĝis pluvarbarego

2: Konfeso de hontanta Vortaristo

3: Serpentaro

4: De lingvo al lingvo

5: Ĝuu kun mi

6: Ŝatata Venĝilo de Putinistoj

7: Jubile, Jubilade, Gargantuece

Palatkareseme

8: Neologismologio

9: Neologismologio2

10: Fazeoloj puraj kaj en dolĉlaktosaŭco

11: Pendanta Pedantulo

12: Rakonto pri kelkaj agrablaj kulturkoloraj renkontiĝoj.

13: Pri pliaj tegmentuloj

14: Kiel ŝafo foje kondukas ŝafiston!

15: Kata Logo

16: Dek-sepa regulo de la Fundamenta Gramatiko

17: Tagmeza Paŭzo

18: Konsultante orientajn brevierojn

19: Pri traboj kaj ŝtipoj

20: Universala Flano Abunda

21: Antaŭferia Gojo

22: Aldone al antaŭa teksteto

23: Eĉ sub simpla frazeto povas kaŝi sin vipero!

24: Vortoj en vortaro

25: Defioj de vortaristoj

V. Fundamento por popolo

La kvina libro klopodas reatentigi pri la Fundamento ... kaj klopodas imagi kiel Zamenhof knedis, poluris kaj fajlis la lingvon. En ĉiu parto de la Fundamento estas videblaj Zamenhofaj ruzaĵoj.

1: Paroloj de spertulo

2: Muŝkribrado: kiu, kiel, kial?

3: Sed kio do ĝi estas?

4: Konfeso pri mia sinteno rilate fundamenton

5: Antaŭparolo

6: Gramatiko

7: Toleremo en la praktiko

8: Ekzercaro

9: Neglektitaĵo

10: Universala Vortaro

11: Esplortrezoro.

12: Kampanoj

13: Aktuala Evoluo

14: Sur Tuŝoŝtono

15: Ludoviko pravigas Rajmondon!

16: Kaĉo el PIV-aj pomoj

17: Unguis incarnatus - Ungodorno

18: Fundamenta Lako

19: Balo kun multe da akcidentoj

20: Nacilingvaj Fundamentoj

21: Gramatikopatio - Lastmomenta aldono

22: Pri la Fundamentoj

VI. Bildo kaj vorto, ĉiela forto

Tiu bitlibro precipe ĝojigos posedantojn de niaj bildvortaroj, pro la saŭco kiun ĝi alportas! En la fino de la libro troviĝas ora ŝlosileto al la nuna versio de nia bildvortaro. Ĝi nepre havas multe da aldona valoro!

1: Bildlingvo en vortaro

2: Kelkaj pripensoj kaj sciigoj rilate novan Bildvortaron

3: Genezo de Bildvortaro

4: Priskribo detala

- 5:** Rande de Bildvortaro
- 6:** Vortarista Nostalgio
- 7:** Tajloro restu je via laboro!
- 8:** Dek Piloloj, dormigaj aŭ vigiligaj
- 9:** Malvegetara Babilo
- 10:** Kompara Butikumado
- 11:** Pliaj butikoj
- 12:** Propono de trankvila diskuto
- 13:** 1988-2012
- 14:** Glose apud misrecenso
- 15:** Mi iom Dudenu
- 16:** Ajĥolco
- 17:** Rigardu la spegulon tra la orelo!
- 18 :** La Hundo en la Verda Mondo
- 19:** Ĉiutagaj pensoj de ĉiutaga homo pri

ĉiutagaj aferoj

20: Ĥameleono Fungeto?

21: Ĥapo estu laŭ la kapo!

VII. Mikspoto

Pluraj tekstoj apudmetas kulturojn kaj kulturdiferencojn. Eĉ simpla buterpano liveras pensomaterialon kaj ĝuon. Dum pluraj paĝoj vi restos apud buterpanon kaj esploros ĝian internaciecon, kaj ... kiel Zamenhof vidis ĝin!

0: Enkonduke

1: Pliaj esprimoj

2: Enŝovo de poemo en la enkonduko de nia PIV-ido

3: Nazo supren, vent(r)o antaŭen.

4: Tri strangaj perloj

5: Eĉ Esperanto (mal)feliĉe, ne jam estas

matematiko

6: Mensogo, ronĝa sonĝo.

7: Kompararo

8: Floroj kun poteto al PIV 2005

9: Seriozeco de verda klaŭno

10: De ĉiela pano al usona buterpano

11: Buterpana kulturo, flandra kaj alia

12: Bona buterpano?

13: Komentoj pri tradukita teksto

14: Kaj se via okulo faligas vin ...

15: Amuza rakonteto pri esprimkaptado

16: Ŝtonetoj de falpuŝiĝo en la Unua Libro?

17: Etimologio pura

18: Repromeno en proverbarbarbo

19: Proverbarbarbarpripensoj

VIII. Aglokula panoramo

Iom pli profunde priskribas frazeologion,
kaj komparas diversaj naciajn esprimojn
kaj proverbojn.

0: Enkonduke

1: Mi trovis la trian piedon de la kato!

2: La kolora dorsmonstro de Vortaristo

3: Ĉu iom da salo sur via buterpano?

4: Pri Vlajo. Legiĝas solene, serene, kun
respekto, majuskle

5: Frazeologio kaj proverbaro

6: Miksbatalo

7: Honore kaj Laŭde al Darvino

8: Nu Jes! Nia Humana Devo!

9: Kiom da muroj havas orelojn, kaj kie?

10: Sub susurado de arbaraj folioj

- 11:** La Teorio de Relativeco, laŭ Petro
- 12:** Ĉina instigo kaj helpo
- 13:** Katologio
- 14:** Impona Impozado ... suferiga
- 15:** Ĉu oni demandas malsanan aŭ ne
- 16:** Testu vin mem, kaj poste kompatu min
- 17:** Eta kontribuo al esperanta
proverbologio
- 18:** Proverba Supo
- 19:** Ŭa, ŭa, lanioario!
- 20:** Hunda ĉifono?
- 21:** Aliloke, alitempe
- 22:** Ĉiuloke, ĉiutempe

IX. Fositaj sulketoj

Romo estas kie la Papo estas ... sed

Esperantujo estas kie Esperantistoj estas.
Traktita ankaŭ estas la demando pri
precizeco kaj ĝusteco.

0: Enkonduke

1: Frazologio

2: Komparoj kaj mistajpoj

3: Kubutado

4: Eskapita kubuto revizitata

5: Interludo - Amuza lingvaĵetaĵo

6: Romo estas kie la Papo estas

7: Portantoj de kulturo?

8: Ĉu kvadrato?

9: Plia Proverba Falpuŝiga Stono!

10: Popolo diras, Dio diras.

11: Apologio pro malĝustaj vortoj.

12: Tamen la ĝusta!

13: Por ke oni klare komprenu min!

14: Flandra kompromiso por solvi
Enigmaton

15: Konstato de limigiteco ...

16: Frandemuloj

17: Sekreto el Zamenhofa kuirejo

18: Pedanteca Kribrado de Fundamentoj

19: Ŝukornoj esprimklarigaj

20: Al kuraĝaj gelukuloj

21: Kiel fromaĝo povas suferigi homon

X. Tentakloj kaj ligiloj

loma fiksado de kelkaj pendantaj nocioj,
sed krom tio la libro enhavas la plenan
registron de la gravaj esprimoj, vortoj,
komparoj, proverboj pritraktitaj en la

diversaj libroj de la serio.

0: Enkonduke

1: Korŝira dilemo aŭ anĝeleca malscio?

2: Peniga nederlanda

3: Finfine ni naĝu

4: La Miso de Liso

5: Bero, bero, bero - bereto

6: Ĉenreakcio per Bildvortaro

7: Biblia Kaprompaĵo

8: Mariskarabetoj

9: Ne "ulo" sed "tulo"

10: Humila konsciiĝo

11: Ĉu ni bezonas Mantelzorgo(n)?

12: Protekta Hidro de la Verda Lago

13: Ankoraŭ pri Bestoblekoj

14: Provo de Pravo de Proverbosenco

15: Ekzemplo de eta Vortarista Ĝojo

Pritraktitaj proverboj kaj esprimoj kaj komparoj kun klarigoj

Ekzemplo:

Arbaro aŭdas, kampo vidas: I 8 – P 253, 1100

– Avertu al babilemulo: neniam pensu ke vi estas ie tute nerimarkite

La proverbo estas pritraktita en bitlibro I, oka ĉapitro. Ĝi aperas en la Zamenhofa proverbaro, en Paragrafoj 253 kaj 1100. Laŭ mi ĝia signifo estas: Avertu al babi ...

Aliaj fontoj:

- Boulton = Marjorie Boulton (Faktoj kaj Fantazioj)
- MZ = Marko Zamenhof (Unua eldono

parta de la proverbaro
sub la nomo de la patro)
- PIV = Plena Ilustrita Vortaro

- P K = Paragrafo Komenca (La unua
paragrafo en la proverbaro ne havas
numeron)

Blovi en **abelujon** IV 21 – P 1069

– Ne agu, kiel individuo, kontraŭ la opinio
de granda grupo

Nebona **afero** enpotiĝis IV 23 – PIV: poto,
enpotigi

– Oni kaŝis, forgesigis malbonaĵon

Malnova **afero** en nova livero (livreo?): VIII
17 – P 1147

– Malnovaĵo prezentita sub nova formo

Ĝi tuŝas lin kiel **akvo** anseron. VII 1 – P
580

– Li tute ne estas afektita per ĝi

Timu **amikon** kiu jam havas flikon: I 7 – P 322

– Ne renovigu amikecon, kun iu; kiu malamikiĝis kun vi

Pli bona estas mal**amiko** de bono: IX 13 – P 99

– Bona ne sufiĉas se pli bona ekzistas kaj oni scias pri ĝi

Traflugis **anĝelo** preter orelo: I 9, VIII 12 – P 21

– Regas subite silento

Arbaro aŭdas, kampo vidas: I 8 – P 253, 1100

– Avertu al babilemulo: neniam pensu ke vi estas ie tute nerimarkite

Avarulo pagas duoble: VII 19 – P 16

– Avarulo havas zorgojn por akiri, kaj poste bedaŭras elspezi

diversaj komparoj: **bela** kiel fazanino, elfo,
anĝelo: VII 7 – PIV: bela

Al ĉiu **besto** plaĉas ĝia nesto: I 4 – P 347,
751

– Oni sentas sin plej komforta en propra
hejmo

Tiun formanĝos la **birdoj** de la ĉielo: I 6 –
PIV birdo (el biblio)

– Li havos malbonan finon

Grandaj mal**bonoj** - grandaj rimedoj: X 3 –
P 149

– Ju pli granda la problemo, des pli
malfacile kuraci ĝin

Ju pli da **bruo**, des malpli da ĝuo: I 10 – P
31

– Oni ne plu ĝuas, kiam oni tro bruas

Li tranĉadis la **buteron** kaj la panon tro
dikaj: IX 1 – propono

– Li vivis tro lukse, tro elspezema

Butonumi iun malvaste: IX 13 – P 449,
867

– Ne lasi al iu grandan liberecon

La **celo** (ne) pravigas la rimedojn/faron: I 4,
8 –PIV: celo

Trafi du **celojn** per unu ŝtono: I 7 – P 291

– Atingi du celojn samtempe, per unu ago

Kiu **centimon** ne tenas, tiu al franko ne
venas. VII 4 – MZ

– Vidu: kiu speson ...

Ĉampanon kaj kaviaron li havis ĉiutage: IX
1 – propono

– Li vivis tro riĉe, tro lukse

Levi la **ĉapon**: IX 19 – propono

– Ĝentile, respektu saluti

La **ĉerizo** sur la torto IV 18 – propono

– La kulmino en atingitaĵo

Aliloka **ĉielo** estas sama ĉielo: VIII 21 – P 1103

– Ĉie estas ebleco senti sin hejmeca

Li havas **dentojn** ne por parado: IX 19 – P 1020

– Li ne lasas sin ofendi

Dio ne ricevis, diablo forlevis: VII 18, 19 – P 16

– Kion vi rifuzas al Dio, poste elspeziĝos por malbono

Aliaj **domoj**, aliaj homoj: VIII 21 – P 508

– Homoj malsamas kaj ankaŭ iliaj agoj kaj kutimoj

duba: diversaj esprimoj por "ĝi estas ankoraŭ ne certa ...": VIII 10 – PIV: duba

Eco homara estas eraro. VII 4 – MZ

– Poste iĝis: Peko kaj eraro estas ecoj de homaro ...

Esti bone **enskribita** ĉe iu: I 6 – P 249

– Havi bonajn rilatojn kun iu, ĝui favoron

Per/Pro **eraro** ne praviĝas la faro: I 7 – P 259, 346, 447, 767, 961

– Ne sufiĉas ke iu afero estas maljusta por kruele agi

Etendita kiel mumio: IX 2

Kiun la **Eternulo** amas, tiun Li punkorektas: III 14 – El biblio

Fajfi je io: I 6 – PIV: fajfi

– Tute ne zorgi pri io

Farita ne refariĝos: IX 13 – P 208

– Ne eblas reiri al originala situacio

Esti en ies **favorlisto**: I 6 – rilatas al P 52

Esti en **favoro** de iu: I 6 – rilatas al P 52

Li skurĝas ĉiun **filon**, kiun Li akceptas: III 14 rilatas al P 52 – El biblio

Vidi ion tra la **fingroj**: I 5, 6 – Breŭgel; en PIV: nur: fajfi tra la fingroj

Fiŝo granda naĝas profunde: X 3 – P 149

– Por atingi grandan celon, oni bezonas grandajn penojn

Nefleksebla kiel Ŝeolo: IX 2 – PIV: fleksi

ne vesti siajn **frazojn** per veluro IV 15 – propono

Razi la **frenezulon**: I 5, 6 –Breŭgel

Fungon englutis: I 3 – P 540

– Li faris stultaĵon, li malsukcesis

Furzi je io: I 6 – PIV: furzi

– Resti tute indiferenta

Ĉu ne povas krevi la **galon?** VII 15 –
Zamenhoftraduko

– Esprimo de alta grada da miro kaj
malkontento

pluraj proverboj pri "**gasto**": II 16

Gasto tro petata (pelata?) foriras malsata:
VIII 12 – P 530

– Se gasto estas tro zorgata, li sentas sin
malkomforta

glavo de Damoklo: II 14 – PIV: Damoklo

– ĉiam minacanta danĝero

Kiu domaĝas **groŝon**, perdas la tutan
poŝon: VII 19 – P 16

– Avertu: ne konduku avare en viaj
bonfaroj, ĉar poste vi bedaŭros

Hakado de ligno donas lignerojn: VIII 18 –
P 273, 398, 673

– Ĉiu profitas de sia ofico

Ĉie estas varme, sed **hejme** plej ĉarme: I 4
– P 536, 751

– Ĉiu preferas propran hejmon

Oni juĝu (ne) **homon** laŭ liaj vestaĵoj: I 4 –
Rilatas al P 340; 926

Esti blanka kaj nigra **hundo**: I 5, 6 –
Breŭgel

Nigra **hundo** inter du blankaj: I 6 – Breŭgel

Kaki sur ion: I 6 – Breŭgel

Li bruligis sian **kandelon** de ambaŭ flankoj:
IX 1 – propono

Melki **kaproviron**. VII 4 – P 45

– Fari sensencaĵon

Meti fajrajn **karbojn** sur ies kapo: X 7 – El
biblio

Preni la **kaŝtanojn** de l' fajro: III 14 –

Konstrui **kastelojn** en la aero: IX 13 – P 275

– Fari al si iluziojn, revu ĥimerajn projektojn

Konstrui **kastelon** sur sablo: IX 13 – P 275

– Fari al si iluziojn

Dum **kato** muson kaptas, ĝi ne kanton kantas: VIII 13 – propono

la **ventkoko** sur la turo IV 18 – propono

– la kulmina punkto de projekto

Fali tra la **korbo**: I 5, 6 – Breŭgel

Korvo al korvo okulon ne pikas: VII 6 – P 302, 307

– Malbonuloj protektas malbonulojn

Havi ĉe iu **krediton** kaj meriton: I 6 – P 249

– Ĝui la estimon de iu

la **kremo** sur la torto IV 18 – propono

– la kulmina punkto de projekto

Krizantemo post la festo de duobla naŭa: I
6 – Ĉina

Meti la **kronon** sur sia laboro: IX 13 –
propono

Meti **kronon** al sia laboro IV 18 – Rilatas al
1141

Proksima **kubuto**, sed ne por la buŝo: IX 3
– P 91

– Ŝajnas facile atingebla, sed tute ne!

Popola **kutimo** havas valoron de leĝo: II 8
– P 1139

– Oni ne malestimu popolajn kutimojn, sed
obeu

Popola **kutimo** havas forton de leĝo: IX 10
– P 1139

– kiel antaŭa

Ŝi havas **langon** mielan, sed koron

kruelan: IX 3 – P 154, 593

– Ŝi ne estas fidinda, bele parolas sed estas kruela

Per **lango** ŝi flatas, per mano batas: IX 3 – P 154

– kiel antaŭa

Plori krokodilajn **larmojn**: I 7 – PIV:
krokodilo

– hipokrite ŝajnigi ĉagrenon aŭ bedaŭron

Vi povas eĉ haki **lignon** sur lia kapo IV 19,
VII 1 – P 580

– Neniel efikas al li, li tute ne zorgas; li estas sen reago

Li bruligis al si la **lipharojn**: I 3 – P 305

– Li hontinde malsukcesis

havi varman **lokon** IV 14 – P 204

– Esti en komforta situacio; esti favorata

jarcento de la **lumoj**: III 16 – PIV: lumo

Lumo fariĝos, kulpo troviĝos: VII 6 – P 261

– Oni trovos la kulpulon

Vespere ĝuu **lunon**, sed ne serĉu la sunon: X 10 – P 1031

– Kontentiĝu per tio kio momente estas havebla

Timu **lupon** edukitan kaj amikon repacigitan: I 7 – P 322

– Ne fidu iun kiu perfidis vin kaj nun deziras reamikiĝi

Kaŝu kiom vi povos, **mensogo** sin elŝovos: VII 6 – P 329

– Avertu: Ne mensogu, ĉar iam vi pentos

Kiu volas **mensogi**, devas bone memori: VII 6 – P 329

– Oni devas bone scii kion oni rakontis se oni mensogis

Mensogu kiom vi volas, sed memoru kion vi parolas: VII 6 – P 32

– kiel antaŭa

Ĉio **supermezura** estas terura: IX 13 – P 1076

– Ekstremaĵoj donas problemojn

Fiera **mieno** - kapo malplena. VII 3 – P 139, 491

– Stultulo kiu tro fiere kondukas

La **muro** havas orelojn: I 8, VIII 9 – P 23

– Avertu: Verŝajne iu subaŭskultas!

Bati du **muŝojn** per unu bato: I 5, 6 – PIV: muŝo

– Sukcese fari du aferojn samtempe

Kalkuli **muŝojn**: V 2 – P 45

– Fari sensencaĵon

Mustardo post la manĝo: I 6 – P 614

– Ĝi venas tro malfrue, ne plu utilas nun!

Li foriris kun longa **nazo**: I 3 – P 540

– Li hontinde foriris post malsukceso

Nazo supren, ventro antaŭen. VII 3 – P 139

– Esti orgojla, tro fieraj

Li zorgas pri ĝi kiel pri **neĝo** pasintjara. VII 1 – P 580

– Li tute ne zorgas pri ĝi, tute ne pensas pri ĝi

Neĝo kaŝas nur ĝis printempo: VII 6 – P 833

– Sekreto ne restas kaŝita

Ankoraŭ **neniu** plaĉis al ĉiu: I 7 – P K, 343, 362, 627

– Iuj ŝatas vin, aliaj ne

Fordormi la **okazon**: I 6 – P 1023

– Maltrafi iun ŝancon

Mi vagis al **okcidento** kaj oriento, sed vivu de l' hejmo la vento: I 4 – propono

Teni **okulon** en la velo: I 5, 6 – Breŭgel

Iufoje oni devas **okulon** fermeti: I 6 – P 366

– Oni ne devas tuj puni pro bagatelaĵo

Teni la **okulojn** en streĉo: I 6 – P 426, 677

– Esti tre atenta

Streĉu la **okulojn**: I 6 – PIV: okulo

Ne perdi el la **okuloj**: I 6 – PIV: okulo

Deĵorigi la **okulojn**: I 6 – PIV: okulo

– tro suprajn: tre atente rigardi

Vidas **okulo**, sed mano ne trafas: IX 3 – P 91, 258, 424

– Ĝi ŝajnas atingebla, sed envere tute ne!

Kiel **oni**, tiel ĉe ni: VIII 21 – P 1103

– Estas ĉie, pli malpli la sama

Sur la **militpado** IV 5 – PIV: pado

Pasero kaptita estas pli bona ol aglo
kaptota: V 8 – Fund. Ekz. 23.13

– Pli bona estas tio kion oni jam havas, ol
tio kion oni promesis

Patroj avaras, infanoj malŝparas. VII 19 –
P 16

– Infanoj de riĉuloj ofte poste rapide ĉion
elspezas

Peko kaj eraro estas ecoj de l' homaro. VII
4 – P K

– Ĉe la kapo de la proverbaro: Homoj
estas pekemaj

Nenia **peketo** restas longe sekreto: VII 6 –
P 833

– Ĉio, precipe misoj, rapide diskoniĝas

Kaki sur la **pendigilon**: I 5, 6 – Breŭgel

Havi blankan **piedon** ĉe iu: I 5 – Breŭgel

Kuru rapide, prenu la **piedojn** en la manoj:
I 11 – PIV: piedo

– Rapide forkuri

Serĉi trian **piedon** ĉe kato. VIII 1 –
Portugala, ŝerce enigma

Serĉi kvinan **piedon** ĉe kato: VIII 1 –
propono

– Fari vanan laboron, serĉi neekzistantajn

Li vidas nur ĝis la **pinto** de sia nazo. VII 4
– P 583

– Li neniel pensas pri estonto; malmulton
komprenas

Kirli en la **poto** IV 21 – propono

– Atentigi pri malbonaĵoj

Danci ĉirkaŭ la **poto** IV 21 – P 450

– Ne kuraĝi rekte diri ion

Kio aliloke **promenas**, ankaŭ al ni venas:
VIII 21 – Boulton

– Kio okazas al aliaj personoj verŝajne
ankaŭ okazos al ni, aŭ povas

Li ne enlasas **puŝon** en la buŝon: IX 19 –
P 995

– Li ne lasas sin ofendi senreage

la alarma **regiono**: II 17 – PIV: regiono 2

Fiŝi malantaŭ la **reto**: I 5, 6 – Breŭgel

Petro **rifuzas**, Paŭlo ekuzas: I 10 – Boulton

– Kio ne taŭgas por unu utilas al alia

Romo estas kie la papo estas: IX 6, IX 7 –
P 416

– Avertu: Akceptu aŭtoritaton

Sidi, marŝi, kuŝi sur **rozoj** II15 – PIV: rozo

– Esti en malagrabla situacio

Delikata kiel folieto de **rozo** II 15 – PIV:
delikata

Ŝiru **rozojn** en somero, ĉar en vintro ili ne
estas: II 15 – P 99

– Faru agojn en la ĝusta tempo

Dormi kiel **rozo**: II 15 – PIV: rozo

Sub la **rozo**: II 14 – propono

Rozo, esprimoj kun: II 15 – PIV: rozo

Sako alenon ne tenas, ĝi baldaŭ elvenas:
VII 6 – P 833

– Frue aŭ malfrue sekreto malkaŝiĝas

Sako malplena, sin rekta ne tenas: VIII 16
– P 563

– Estas malfacile por mizerulo resti
senpeka

Malplena **sako** puŝas al ŝtelo: VIII 16 – P 563

– Mizerulo estas tentata al ŝtelado aŭ aliaj pekoj

Esprimoj pri "**salo**": II 20 – PIV: salo

Malsana demandu, al sana donu. VII 4 – P 144

– Ŝerca respondo al sugesta demando

Ĉu oni donu al **malsana** aŭ ne? VIII 15 – P 144

Ne **sanktuloj** potojn faras: IX 9 – P 123

– Ne necesas esti eminentulo por fari tion

Tro **sata**, tro bata: I 13, X 10 – P 906

– Trosateco de io kondukas al naŭziĝo de ĝi

Satigi **scivolemon**: VIII 2 – propono

– Kontentigi la deziron de iu pri scio

Sub la **sigelo** de silento: II 14 – PIV: sigelo 5

Novaj **sinjoroj** – novaj moroj: VIII 21 – P 893

– Ĉe ŝanĝiĝo de mastro oni devas adapti sian konduton

Sed kiu **sonorigos** la katon? III 14 – propono

– Rimarko: jes, bona ideo, sed kiu kuraĝas fari ĝin?

Kiu **speson** ne tenas, tiu al spesmilo ne venas; VII 4 – P 664

– Oni ankaŭ estimu kaj konsideru malgrandaĵojn

Li **spezis** pli elen ol enen: IX 1 – propono

– Li vivis tro senzorge

Nova **stato** – nova vivo: VIII 21 – P 893

– Novaj cirkonstancoj bezonas novajn

manierojn

Surmeto rompas, komparo trompas: I 7 –
P 322

– Ne lasu vin influi de komparoj; ĉiu
komparo lamas

Granda **ŝipo** bezonas profundon: X 3 – P
149

– Granda familio necesigas grandajn
elspezojn

Stulta kiel **ŝtipo**. Ŝtipulo: IX 14 – PIV: ŝtipo

– Stultulo

Per unu **ŝtono** oni du ĵetojn ne faras: I 6 –
P 625

– Oni devas uzi okazon kaj ne atendi
sekvontan

Ruliĝanta **ŝtono** ne kolektas muskon: X 14
– P

– Admono, puŝo al aktiveco, ĉar neniu

deziras ke muelŝtono iĝu muskokovrita.

Serĉi la **tagon** pasintan: X 10 – P 1031

– Fari sensencaĵojn, aŭ melankolie memori pri pasinteco

Plenumiĝos la **tasko** per granda fiasko: I 6, IX 13 – P 847

– Estis granda malsukceso

La **tempo** ĉiam malkaŝas la veron: VII 6 – P 933

– Oni ne povas eterne gardi sekreton

Tempo toleras, sed vero aperas: VII 6 – P 331

– Sekrete ne restas eterne kaŝita

Alia(j) **tempo(j)**, aliaj moroj: VIII 21 – P 780

– Moroj ŝanĝiĝas en la daŭro de la historio

Eĉ el sub la **tero** aperos la vero: VII 6 – P 833

– Vero finfine koniĝos

Alia **urbo**, alia moro: VIII 21 – P 508

– Ĉiu regiono havas proprajn kutimojn

Urson al mielo oni ne tiras per orelo: I 10 – P 31

Urson al mielo oni ne tiras: VIII 12 – P 31

– Oni ne trudu al aliaj homoj eĉ ion bonan, se ili ne deziras ĝin

vi estas **varma**/varme IV 14 – PIV varma

– Esti proksime de serĉata objekto

Post brua **vento**, subita silento: I 9 – P 21

– Silento post la ŝtormo; subita silento post bruo

Li serĉas la **venton** sur la kampo: X 10 – P 1031

– Perdi tempon; serĉi ion kio ne ekzistas aŭ ne palpeblas

Valoras ne la **vesto**, valoras la enesto: I 7
– P 1127

– Ne la ekstero sed la interno gravas ĉe
homo

Kia oni vin **vidas**, tia oni vin taksas: I 7 – P
340

– Fakte kontraŭo de antaŭa! Oni ofte juĝas
homon laŭ aspekto

Ne lasi el la **vidkampo**: I 6 – Breŭgel

Virino eliĝis, kaleŝa senpeziĝis: I 10, VII 4
– P 31

– Liberigita de io ĝena, afero pli bone
progresos

Malĝentilaĵoj pri **virinoj**: I 12 – pluraj en
PIV

Perdi la **vizaĝon**: I 11 – Ĉina

– Perdi sian prestiĝon, sian aŭtoritaton

Ŝi havas **vizaĝon** sen kulpo, sed koron de

vulpo: IX 3 – P 154

– Ŝi aspektas fidinda, sed fakte estas
sentaŭga, trompa

Akcepti la popolan **voĉon** kiel dian: IX 10 –
rilatas al P 436

– Kion la popolo deziras aŭ regule faras
havas forton de leĝo

Ne vindi siajn **vortojn** en tukojn IV 15 –
propono

Pritraktitaj vortoj kun indiko de libro kaj ĉapitro

anatomio: skeĉo de Rajmondo Ŝvarc' kun
bonlingvaj nomoj por korpaj partoj: VII 9

arkturo: II 5

aronio: X 5

aŝaro: III 12

miks**batalo**: VIII 6

glazurita **benjeto**: IX 16

bereto: VI 6

pom**bero**: X 5

arbut**bero**: X 5

biglo: VIII 7

bleki, diversaj blekoj: III 6

blutilo: X 6

breloko: II 5

brio: II 5

bruoj dum aŭskultado de kuracisto: II 18

buĉopecoj: VI 9

kolbaspufbulko: IX 16

cindrulino: VII 4

ĉapoj, kapvestoj: VI 21

labor**ĉapo**: VI 12

damo - damoj: V 11

daturo: V 16

ungo**dorno**: V 17

efektadi: X 13

ekimoza: II 5

emberizo: II 5

enpremokulero: VI 14

falbalo: V 19

fazeoloj, diversaj specoj: III 2, 3

nomoj de partoj de defluejo: X 2

folioto, ŝanĝiĝema: VI 20

fontolo: X 9

fontulo: X 9

franĝo: V 19

galuso: III 7

granulo: VI 8

haĉiki: IX 13

paĝia **hararanĝo** IX

harfendi, harspliti: V 2

Harpokrato: II 14

hundoj, multaj rasoj: VI 18

impozi: VIII 14

jakobukleto: II 13

kamelkaprino: III 17, 18

kamloto: III 17

ŝtip**kap**pulo: IX 14

kapono: VI 10

azia konusa **kasko**: VI 5

kato: III 15

muŝkribri: V 2

kriko: II 5

krikrii: III 6

krispo: III 11

kŭaks, kŭaks, brekekekeks: III 6

pri**kub**uti: IX 3

trak**ubuti** sian vojon: IX 3

kupo: III 12

kuso: III 12

laĉilo: II 13

lako; V 18, VII 8

lampo: II 8

pantografa murl**ampo**: VI 5

laniario: VIII 19

havi kubut**libere**con: IX 3

limpado: III 1

liso: X 4

lodeno: III 18

lozanĝo: VI 8

infan**ludoj**: VI 7

bufedol**umigilo**: VI 15

miogalo: III 9, 10

movoerigilo: VI 15

oblato: VI 8

buter**pano:** VII 10-13, VIII 3

pom**pasteço:** IX 16

pastelo: VI 8

perineo: VIII 2

pilolo: VI 8

piloto: II 8

kapsul**plenigilo:** VI 8

pliko: III 11

plugoskribado: II 14

plumo: partoj de plumo: IX 15

polituri: V 18

poluri: V 18

pometo: III 1

dorn**pomo**: V 16

pomoj: V 16

terpomo: V 15

kandita **pomo**: IX 16

pomborilo kaj sinonimoj: X 6

poneo IX

poreeto, odoranta poreeto: III 13

stup**premilo**: X 6

pikli: III 1

pudingo: III 8

pulovero kaj aliaj similaj vestoj: IX

pulvoro: VI 8

mal**purulo**: VII 4

puvaterapio: III 1

reflektoro IX

rezino: V 18

riglilo: VI 19

rulvolvilo: II 13

salikokoj: VI 4

sallo: VIII 2

ovokrona **sandviĉeto:** III 5

sandviĉo: VIII 3

senflavaĵovo: II 13

setano: III 12

sibarita: II 5

vo-signi: IX 13

skarpo: VII 5

spegulo, de boato, de besto: VI 17

stavo: III 12

porkata **sternaĵo**: VI 10, 12

suka: II 10

suko: VIII 11

interglutea **sulko**: VIII 2

ŝalo: VII 5

ŝtipo; ŝtipkapulo: IX 14

ŝutrotenilo: II 13

tablojdo: VI 8

tabuvortoj, naŭa oficiala aldono: III 19

ĉemizojn ... ni nomas **tolaĵo**, kvankam ne
ĉio estas farita el tolo: II 18.

tolaĵo: V 8

trapuŝilo: II 13

kudril**trueto**, orelo, okulo, : VI 17

kolt**uko**: VII 5

enkarniĝinta **ungo**: V 7

verniso: V 18

porviraj **vestaĵoj** (de subĉemizo ĝis
surtuto): IX 12

Bavaria folklor**vesto**: X 6

zumi: III 4

Kolofono

Titolo: Tentakloj kaj Ligiloj

Aŭtoro: Petro Desmet'

Kovrilo: Tinuĝin

< UDK: 18.98

NUR: 627

IBAN: 17-11-304-392

Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekenstraat 169 - 2060 Antwerpen

www.retbutiko.be

© 2020 FEL, Antverpeno

Tio ĉi estas nekompleta senpaga provversio.
Ĝi povas esti libere kopiata.

Verkoj de la sama aŭtoro

Serio: Lingvaj defioj:

1. [Proverboj sub lupeo](#) - *Verdaj esprimoj en Breŭgelsaŭco*
2. [Esperanto kaj kulturo](#) - *Esperantokulturo esprime kaj proverbe*
3. [Vortarludoj](#) - *Etimologio de verda pudingo*
4. [Vortoj, vortaroj, vortaristoj](#) - *Kulturkoloraj renkontiĝoj*
5. [Fundamento por Popolo](#) - *Fundamento sur tuŝoŝtono*
6. *Bildo kaj vorto, ĉiela forto - Bilde tra la lingvo*
7. *Mikspoto - Esprimokaptado senĉese suka*
8. *Aglokula panoramo - Sub susurado de verdaj folioj*
9. *Fositaj Sulketoj - Popolo esprimas, Dio esprimas*
10. *Tentakloj kaj Ligiloj - Kun plena indekso de la dekopo*

Vortaroj:

- [Bildvortaro en Esperanto](#)
- [Nederlands-Esperanto-Nederlands
Woordenboek](#)
- [Esprimaro - Promenoj en Edeno](#)
- [Zakwoordenboekje Poŝvortareto](#)
- [Vasta vortaro/Uitgebreid woordenboek
Esperanto-Nederlands](#)

Enhavo

Tentakloj kaj Ligiloj	2
Kolofono	98
Enkonduke	3
1. Korŝira dilemo aŭ anĝeleca malscio?	5
Anekdoto	5
Faktoj	6
Kaj fantazio?	7
Kiel kio kaj kial	8
Limoj kvazaŭ netransvenkeblaj	9
2. Peniga nederlanda	10
Lango glaciiginta	10
Plusinstruo	11
Kaj kio pri ŝutroj?	11
Reagoj	15
3. Finfine ni naĝu!	18
Ŝipoj grandaj kaj malgrandaj	18
Paragrafo 149a	19
Unua helpilo	19
PIV-a malforto	20
Nacilingva helpilo	21

Instruo	22
Reagoj	23
4. La Miso de Liso	25
Eksa liso, kiu ne sukcesis oficialiĝi	25
Kolizio de etimoj!	25
Fuŝdifino	25
Kaj la ŝafaro?	25
Malnova Bildvortaro	25
Nova Bildvortaro	25
Aldoneto senrilata	25
5. Bero, bero, bero ... bereto	26
Ne lasu vin gvidi pernaze	26
Kio estas (krom aero) en nomo?	26
En propra ĝardeno	26
En Angloland	26
Kromekskursetoj PIV-en	26
Konkludo	26
Neceso kaj Sufiĉo	26
Reagoj	26
6. Ĉenreakcio per Bildvortaro	27
Evoluo rimarkinda	27
Televida puŝo	27
Kaj tamen ...	27

La ŝultra jugo	27
Ĉu necesa? Ĉu nepre bezonata?	27
Bedaŭro ... iom ...	27
Reagoj	27
7. Biblia Kaprompaĵo	28
PIV-a fonto	28
Normvortara malakordiĝo	28
Biblia fonto	28
Konkludo	28
Reagoj	28
8. Mariskarabeto	29
Taga novaĵo	29
Kiel distingi?	32
9. Ne "ulo" sed "tulo"!	34
Alvoko kaj priskribo	34
Klopodo vana	34
Reagoj	34
10. Humila konsciiĝo	35
Rezultoj	35
Konkludo	35
Proverbara Gramatiko	35
Kromefikoj – La vojo returnen	35
Serpentumaj vojoj	35

Transiro	35
Nebula esprimo	35
Bastajda Najloserĉado	35
Senkulpigo	35
Reagoj	35
11. Ĉu ni vere bezonas Mantelzorgon?	36
Ĉu bezonata?	36
Noveco	36
Tradukebla?	36
12. Protekta Hidro de la Verda Lago	37
Meduzo iĝu Hidro	37
Priskribo de ĝia fizionomio	37
Logikeco de la sistemo	37
Zamenhofa saĝeco	37
Postuloj de vivantaj lingvoj	37
Falseco de falsamikaroj	37
Ĉu pelmelo, ĉu brikabrako, mikspoto, tohuvabohuo?	37
Prava decido	37
13. Ankoraŭ pri bestoblekoj	38
Pravigo de nia bleksimfonio.	38
Raŭpa Bleko.	38
Aldona pripenso	38

Ne finiĝis la informado	38
Pri fontoj	38
Botaŭro [Roerdomp]	38
14. Provo de Pravo de Proverbosenco	39
Ĉu en proverbaro?	39
Senco?	39
Kontraŭargumentado	39
Kolizio	39
Kie la pravo?	39
15. Ekzemplo de eta ĝojiga travivaĵo de vortaristo	40
Defifonto	40
Normvortaro	40
La ĉio(n)scia PIV	40
Kaj nia PIV-ido?	40
Specifikeco de Esperanto	40
Postĉeriza pripenso	40
Praktitaj proverboj aŭ esprimoj en tiu ĉi bitlibro	40
Traktitaj vortoj en tiu ĉi bitlibro	40
Bitlibroj - priskribo kaj enhavtabelo	41
I. Proverboj sub lupeo	41
II. Esperanto kaj kulturo	42

III. Vortarludoj	44
IV. Vortoj, vortaroj, vortaristoj	46
V. Fundamento por popolo	48
VI. Bildo kaj vorto, ĉiela forto	50
VII. Mikspoto	52
VIII. Aglokula panoramo	54
IX. Fositaj sulketoj	55
X. Tentakloj kaj ligiloj	57
Pritraktitaj proverboj kaj esprimoj kaj komparoj kun klarigoj	60
Pritraktitaj vortoj kun indiko de libro kaj ĉapitro	88
Verkoj de la sama aŭtoro	99